

TERMINOTEKO

Informilo pri terminara laboro en Esperanto en kunlaboro kun

Perkomputora Termino-Kolekto (Pekoteko)

12

Cirkulero n-ro 12 (5a jaro, 2/1995)

«95-12-15»

Estimata sinjorino, estimata sinjoro,
karaj geamikoj,

centra temo de tiu ĉi cirkulero estas revizio de Plena Ilustrita Vortaro (**PIV2**). Teknike ĝi okazas per kreado de komputore legeblaj dosieroj. Tiuj servu samtempe al plia projekto, nome al Multlingva Elektronika Vortaro (**MEVo**). Celante nur elektronikan, ne libroforman uzon ĝi unuigos PIV-on, Bildvortaron, Pekotekon kaj multajn aliajn vortarojn en unu giganta kolekto. Krome ni raportas pri mikrofika eldono de la dua parto (literoj K-Z) de la fama Enciklopedia Vortaro de **Wüster**. Jen do la probable plej gravaj vortaroj de nia lingvo oni nuntempe revizias por aktualigita versio! Kia agraba pruvo pri la viveco de la Internacia Lingvo.

Kun afablaj salutoj

enhavo

Reagoj.....	34
PIV en elektronika vesto.....	35
Revizantoj de PIV: <i>Roux</i>	36
Serĉataj: Reviziantoj kaj fakoj	37
Multlingva Elektronika Vortaro:	
<i>Eichholz kaj la MEVo</i>	41
Novaj terminaroj: <i>Wüster k-z</i>	46
Terminaraj Projektoj: <i>Ekologia</i>	49
Esperantologio: <i>Welger</i>	53
Terminologia kurso:	
<i>De Niederaffingen al Rastatt</i>	57
Iom pri la komputoro: <i>Skriboj</i>	58
Listo de elektronikaj E-aĵoj	61
Korektoj	62
Lingvaj diskutoj:	
<i>Blankaj Abioj en Nigra Arbaro</i>	60
Aktuala terminaro: <i>robotfoto</i>	63
Terminoteko: <i>adreso por reagoj</i>	63
Niaj vortaristoj: <i>Broadribb</i>	64
Nekrologo: <i>Vilma Eichholz</i>	64
La historia citaĵo: <i>Zamenhof</i>	64

Sinjoro André **Martin** atentigas, ke la grupo ĉirkaŭ la sindikata vortaro (Terminoteko 7, p.9) estas atingebla per jena nova adreso: FGTEB-Esperanto, A.T.A.C., Rue Bastin 59 *16.7, B-5000 Namur, Belgujo. 95-09-27

»Jam de jaroj mi sugestas la kreadon de ĝenerala bibliografio. Do mi povas nur aplaŭdi vian entreprenon. Milda kritiko/demando/ sugesto: Kial ĉiam paroli pri IBM? Mi havas alian aparaton! Kaj estus bone havi materialon kiu taŭgu por ĉiu aparato! Verŝajne niaj informadikistoj/komputoristoj havos la necesajn teknikajn rimedojn. ...« Ak. d-ro **Albault**, Francujo, 95-09-28.

Je nia responda sugesto d-ro Albault sendis al ni sian privatan liston de publikigaĵoj, por ke ni aldonu ilin al la perkompatora bibliografio EBFA. Ni invitas ĉiujn legantojn agi simile kaj **sendi al ni tiajn listojn.**

Per la indikoj pri la uzata formato ni fakte ne volis varbi por iu sistemo, sed faciligi al la legantoj la decidon, ĉu indas akiri materialon en iu formo, kiun li eble per la propra maŝino ne povas utiligi. Bedaŭrinde malsamaj sistemoj ja daŭre kaŭzas transform-problemojn.

Sinjoro **Welger**, Germanujo, je 95-10-09 atentigas pri la historia citaĵo de Zamenhof (vd. lastan paĝon) kaj skribas (elgermanigo de ni): »Mi opinias, ke oni uzu la nociojn „nova vorto“ kaj „neologismo“ pro klareco kaj respekte al la aŭtenta interpretado de

Zamenhof nur en tiu senco. La sendistinga uzo de „neologismo“ kaj „nova vorto“, eĉ se ebla pro la 15a regulo, estas evitiinda.«

Prof. **Minnaja**, Italujo, skribas pri la malfavoraj recenzoj de la *Grand Dictionnaire de Le Puil-Danvy* (vd. la leteron de s-ro Lutermano en Terminoteko 11, p. 18): »... estus tamen ekvilibrige citi ke mia recenzo aperinta en Heroldo tute ne estis tiel draŝe katastrofa. La ege malfavora recenzo de *Hauptenthal* en *Iltis-Forumo* 1993, p. 73-83, estas pli ol plurloke pridubinda ...; la recenzo de *Simonnet* en Literatura Foiro estis siaflanke de mi kontraŭrecenzita en la septembra n-ro de Literatura Foiro 1995. Kompreneble, se recenzanto starigas maleblajn kriteriojn kiujn vortaro devas kontentigi, neniu vortaro estus taŭga...« 1995-10-05

Jen plia voĉo pri la GDFE. Ni tre rekomendas ekhavi propran opinion pri tiu vortaro kaj havigi ĝin.

Pri la listo de elektronikaj tekstoj prof. **Minnaja** dezirus indikojn pri prezoj kaj trovlokoj en la komputora Reto. Nu, multajn materialojn ni ricevis donace aŭ interŝanĝe kaj pro tio ne konas la prezojn kaj aliron al la Reto ni pro la kostoj ne jam havas.

».. mi estas tre impresita, legante pri la multaj terminologiaj laboroj kiuj estas evoluantaj; ĉu oni iam konstatis tian elanon sur tiu kampo?« D-ro Ebbe **Vilborg**, Svedujo, 1995-11-10

PIV en elektronika vesto


Pri la reviziado de Plena Ilustrita Vortaro (PIV) de 1970 oni jam jen kaj jen povis legi en la ĝenerala Esperanta gazetararo. Detlev **Blanke** en Heroldo de Esperanto (HdE) 12-13/1994, p. 4-6 demandis »Reviziado de PIV - ĉu sekreto?«. Prof. Michel **Duc Goninaz**, Val Saint-Georges, Chemin de l'Échelle, F-13100 Aix-en-Provence, Francujo, kiu gvidas la rondon, prizorgantan aktualigotan version de la gvida vortaro de Esperanto, respondis publike en HdE de la 14a de Januaro 1995. Same kaj samloke faris »la Plenum-komitato de SAT«. El tio oni eksciis, ke partoprenas la redaktan laboron, »dudek fakuloj kaj pluraj dekoj da bonvolaj korespondantoj«. »Oni konsciis, ke la entreprenita laboro celas nur senerarigon kaj ĝisdatigon de PIV« laŭ la „politiko“ (t.e. la principoj) vortumitaj en paĝoj IX ĝis XXXIII de PIV kaj paĝoj 3 ĝis 5 de ĝia Suplemento.

Sub la gvido de doktoro **Claude Roux**, kiu respondecas pri la teknikaj aspektoj de la revizia laboro, inter-

tempe estis produktita elektronika versio de la vortaro per skanatoro, do aparato, kiu povas "legi" presitan tekston kaj lige kun komputoro povas "traduki" al elektronika formo. Praktike la skanado kaŭzas multajn detalajn problemojn pro la multaj diversaj simboloj, kiujn PIV enhavas, tiel ke zorga kontrolado de la skanaĵoj necesis. Ankaŭ tiu etapo intertempe finiĝis kaj la enhava reviziado komenciĝis. D-ro Roux sendis al ni aktualan liston de la fakoj kaj reviziantoj, kiujn ni danke publikigas en tiu ĉi numero. Aparte ni atentigas pri la fakoj por kiuj ankoraŭ urĝe mankas reviziantojn. Esperantistoj kun tre bonaj fakaj kaj lingvaj konoj rekte skribu al **d-ro Claude Roux, 6, Bd. des Pins, Les Borels, F-13015 Marseille, Francujo**.

Akademiano **Eichholz**, estanta unu de la reviziantoj, sendis al ni sian cirkuleron EP 95/1, en kiu li priskribas siajn unuajn spertojn dum la reviziado de i.a. la paĝoj 346-359 de PIV (litero G). Temas pri sia privata opinio, ne pri iu oficiala opinio de SAT:

daŭrigo sur paĝo 37



korektindaj difinoj, ol mi imagis, kaj verŝajne ankaŭ, ol SAT intencis ŝanĝi. Laŭ mia opinio nun estas la ĝusta momento por decidi pri redakto-principoj por PIV2, ĉar nun ŝanĝoj estas plej facile plenumblaj, kaj ŝparus superfluan laboron. ...

Dum PIV estis planita por servi al spertaj Esperantistoj, la Mevo-projekto [pri kiu vd. malsupre] estis planita por servi ankaŭ al komencantoj kaj eĉ al ne-Esperantistoj. Tial mi atribuas verŝajne pli gravan rolon ol SAT al facila diveno de termino-elementoj ... Mi ja opinias, ke ni devus fari ĉion eblan, por faciligi la lernadon kaj komprenadon de nia lingvo.

1. Ĝeneralaj konsideroj:

1.1 PIV utiligis la strukturon de PV, verkon, kiun oni kompilis en la dudekaj jaroj. Tiam nia lingvo ankoraŭ ne estis firme establita kaj gravis identigi la aŭtorojn de tekstoj de niaj plej gravaj verkistoj. Gravis montri, kiuj vortoj troviĝis en la Fundamento kaj kiuj estis pli poste oficialigitaj de la Akademio. Ĉiujn aliajn vortojn la tiamaj lingvo-aplikantoj konsideru kiel neologismojn, kiujn oni devus difini, se oni deziras uzi ilin. Intertempe pasis sep jardekoj kaj multaj ankoraŭ ne oficialigitaj vortoj fariĝis ĉiutagaj, tiel kutimaj, ke neniu Esperantisto inklinus difini ilin. Aliflanke ekzistas en PIV multaj veraj neologismoj, kiujn aplikanto devus difini, ĉar oni ne antaŭsupozu, ke ĉiu legonto havus PIV-on ĉemane. Tio estis ĉiam mia plej grava kritiko de PIV, ke ĝi tute same registris bone establitan vorton ankoraŭ ne oficialigitan, kaj veran

neologismon, proponitan de unu aŭ du personoj.

Sed dum la jaroj establiĝis kutimo rezigni pri difino, se la termino estas registrita en PV kaj pli poste ankaŭ en PIV. Ankaŭ mi faris tion je la redaktado de la Esperanta Bildvortaro. Dum tiu laboro mi ofte konstatis, ke PV- aŭ PIV-difinoj estis ŝanĝendaj en kelkaj detaloj por konveni al bildigita nocio. Kun firmiĝo kaj moderniĝo de nia lingvo establiĝis novaj kategorioj pri uzateco, kiuj fariĝis pli signifaj por nuntempa Esperantisto:

1. Terminoj registritaj en "Plena Vortaro";
2. Terminoj registritaj en "Plena Ilustrita Vortaro";
3. Terminoj el "Plena Ilustrita Vortaro", sed kun iom ŝanĝitaj difinoj;
4. Terminoj ne troveblaj en PIV, sed en aliaj vortaroj;
5. Terminoj ankoraŭ ne troveblaj en iu ajn vortaro.

Por kategorioj 4 kaj 5 aplikanto de termino nepre aldonu difinojn, por kategorio 3 nur, se la aplikanto uzas la terminon kun iom alia signifo ol difinita en PIV...

1.2 Majusklaĵaj komencliteroj je propraj nomoj kaj derivaĵoj de propraj nomoj.

Waringhien hezitis doni firmajn decidojn pri tio (p.xxxii) kaj tial troviĝas en la nuna PIV ambaŭ skribmanieroj. En Mevo mi konsekvence sekvas la rekomendojn de d-ro *Albault* en la deka eldono de la Fundamento. Mi opinias, ke estas dezirinde, ke ankaŭ PIV faru tion. Transiro al racia markado de propraj nomoj kaj iliaj derivaĵoj nun estas facile plenumbla.

2. Principoj, pri kies apliko valorus diskuti:

2.1 Se en PIV estis registritaj arĥaigintaj vortoj, ili estu tiel klare markitaj. Ni ne enmetu malofte uzatajn vortojn kun preciza sama signifo kiel ofte uzata vorto nur tial, ĉar Zamenhof kelkfoje uzis ĝin. Ekz.: sem-grajno = grajno (1).

2.2 Oni preferu simplan lingvon, se tiel estas esprimebla en malambigua maniero la enhavo de la nocio: Ekz-e: gramatiko (2): "Tuto de la reguloj, kiujn oni devas observi por korekte paroli aŭ skribi unu lingvon." Pli mallonge: "Ĉiuj observendaj reguloj por korekte paroli aŭ skribi lingvon."

3. Pli bonigindaj detaloj:

3.1 Superflua afiksoj estu evitataj:

3.11 -ec/:

a) "Perdi la starecon kaj ekvilibron, marŝante sur glata supraĵo". [→ gliti (3)] Sufiĉas: Perdi staron (aŭ: star-kapablon) kaj ekvilibron, ... ("stareco" ne troviĝas en PIV).

b) Bv. studi pri tiu temo la tre bonan artikolon de Doug Portmann: "La mezurvortoj en la Faklingvo de Esperanto: Kiel forigi la "ec"-malsanon" (Akademiaj Studoj 1988-1990, p.227). Mi konstatis, ke ofte PIV-tekstoj pekas kontraŭ tiu rekomendo.

3.12 PIV rekomendu pli precizan aplikon de afiksoj:

-il/: **gluilo** estu iu ajn helpilo por glui ion, ekz. glu-peniko EB#50/27 aŭ glu-ŝmirilo EB#238/45, glu-ŝmira broso EB121/37. Sed ĝi ne estu sinonimo por **gluaĵo** (laŭ PIV = gluan-

ta substanco) La substanco mi rekomendas nomi **gluenzo**, ĉar gluaĵo povus ankaŭ esti iu ajn gluita objekto. En faklingvo la sufikso -enz/ jam firme establiĝis.

aviadilo. PIV enkondukis la preferindan "avio", kial ne uzi tiun vorton ankaŭ en difinoj, ĉar avio ne estas ilo (=simpla instrumento aŭ aparato).

3.13 PIV apliku pli trafajn prepoziciojn:

prigrati: "La malliberulo prigratis sur la muro versojn kaj bildojn."

Mi preferus: **engrati** La malliberulo engratis (aŭ enskrapis) en la muron versojn kaj bildojn. "prigrati" ŝajnas al mi analoga al "priskribi", kaj neniu priskribo-simila komento okazis ĉi tie. Poste "prigrati" estas difinita per "produkti per gratoj". En la artikolo pri "pri" mi nenie trovis, ke "pri" povus havi la signifon de "produkti per."

→ graviti: "Forto kuntiranta al iu maso alian mason" aŭ: forstreku "kun", aŭ "Fortu kuntiranta du masojn".

→ grefti (2): Enplanti sur individuon pecon el histo Pli bone: Planti en individuon

→ grumo: Ne: Ĉevalzorganta servisto"; sed: Ĉevalprizorganta servisto."

→ plafon-grundo. Ne: La natura grundo sur tunelo; sed: La natura grundo super tunelo.

3.14 PIV uzu en difinoj laŭeble la plej kutimajn terminojn, eĉ se pli frue estis sinonime uzataj ne tiel klaraj terminoj: "birdo-gluo" estis difinita per "**viskeca** substanco". Mi devis serĉi en PIV la difinon de "viskeca" kaj trovis, ke ĝi estis

sinonimo por la tute konata "viskoza". Eĉ se tiu gluo estis akirita el la beroj de visko, ĝi ne fariĝis per tio viskeca, kio povus signifi pendoplanteca, sed neniam glua.

Anstataŭ "evitu la **nutrojn**, kiuj grasigas;" (→ grasigi) ŝajnas al mi pli kompreneble diri: "evitu nutraĵojn, kiuj grasigas;" Mi pensis unue, ke oni uzis "nutro" kun la signifo de nutromaniero:.

Ĉu oni en la hodiaŭa lingvo vere diras: "la stepoj de dezerto **grasiĝos**;"? Pli kompreneble estus: "stepoj fekundiĝis el dezerto;"

Ankaŭ "**grasumo**" kun la signifo de "sterko" ne ŝajnas al mi imitinda. Tion oni nepre devus indiki en PIV.

La sekvantan terminon mi forstrekus: **ŝmir-graso** = grasa korpo uzata por ŝmiri (maŝinojn ks.), ĉar "ŝmirajo" anstataŭas ĝin. ...

Hodiaŭ oni dresas bestojn, sed ne plu homojn, tial mi ŝanĝus post grenadisto "Soldato speciale **dresita** ĵeti grenadojn" al "Soldato speciale trejnita ĵeti grenadojn."

La lingvo estu kiel eble plej simpla: Ekz-e sub **grio**:

Ne: "Greno muelita en grandajn erojn kaj senigita je l' ŝeloj".

Sed: "Malfajne muelita greno senigita de ŝeloj."

→grimpi (3): "grimpanta rozujo", pli kutima: "grimpanta roz-planto".

→gripo: Anstataŭ "spiraparato" oni prefere uzu "spir-organo", ĉar la gripo ne trafas aparaton en la hospitalo, sed organon de paciento.

→grocisto: La prepozicio "po" estas ofte malĝuste aplikata, tial mi rekomendas laŭeble ne uzi ĝin.

Anstataŭ: "Vendisto, kiu vendas en po grandaj kvantoj", mi dirus: "Vendisto, kiu vendas en grandaj kvantoj", aŭ: "kiu vendas nur grandkvante", aŭ: "kiu vendas nur pogrande".

3.15 Se iu en PIV donita difino arĥaikiĝis, oni indiku tion, por eviti, ke lingvo-praktikantoj imitu tiun lingvo-uzon. Hodiaŭ oni uzas la vorton "grasaĵo" certe ne por indiki "plej bonan nutraĵon"!

3.16 En PIV troviĝas amaso da por moderna homo ne kompreneblaj proverboj. Mi rekomendus forstrecki ilin, ĉar ili ŝajnigas arĥaikiĝon de nia lingvo. Ekz.: "Se oni gratas nur sangeron el la haŭto, nenia sanigilo povas savi de morto."

Ĉu oni volis diri, ke granda operacio estas bezonata, por sanigi mort-malsanan homon?

3.17 Apliko de arĥaikiĝintaj terminoj: Oni ne plu uzas la verbon "gravuri", se oni alcelas nur registradon de sonoj sur gramofona disko.

4 Stilaj eraroj:

4.1 Uzi akuzativon de direkto kaj tuj post ĝi la akuzativon de rekta objekto laŭ mia lingvo-sento estas malbonstila: inviti Parizon kelkajn plej gravajn Esperantistojn; (→ grava (1))

4.2 "unu" uzata kiel nedifinita artikolo: glui (2): Fari ke unu objekto estu fiksita kun alia.

→diskutgrupo: ... por interŝanĝi ideojn pri unu difinita temo.

→laborgrupo: por fari pri unu limigita temo

4.3 Tro ofta uzo de la difinita artikolo: glumo: Unu el la du malplenaj brakteoj ĉe la bazo de la spiketoj ĉe graminacoj. grafikaĵo: Scienca desegno servanta por la tekniko kaj prezentanta la fenomenojn aŭ iliajn abstraktajn rilatojn per belgrajno: Nigra aŭ bruna makuleto, kiu denaske markas la vangon aŭ lipon, kaj donas al virina vizaĝo ian pikantecon. gramofono: Aparato reproduktanta la sonojn per plataj diskoj. (Tiu difino estas ankaŭ ne sufiĉe preciza, ĉar ekzistas hodiaŭ multaj aliaj aparatoj, kiuj reproduktas sonojn per plataj diskoj, kaj kiujn oni ne nomas gramofonoj.)

4.4 Manko de objekto post transitiva verbo: post gluti (2): "avide alproprigi:"

4.5 Ekzisto de objekto post netransitiva verbo: "Tiu gravediĝis malbonon ..". (→ graveda).

4.6 -ata/-ita problemo: Se oni parolas pri "greftaĵo" la greftado jam okazis, tial la participo estu "greftita" anstataŭ "greftata".

5. Neklaraj difinoj:

5.1 vostoglitado: Ĉu la avio staras sur la tero kaj rulas malantaŭen pro efiko de gravito? Aŭ ĉu tio okazas dum la flugo? Ambaŭ kazoj ne ŝajnas al mi eblaj. La vosto ja estas avio-parto, kiu ne povas moviĝi sendepende de la avio-korpo. Mi ne kapablis trovi etnolingvajn tradukojn por tiu ĉi nocio. Por informo mi estus danka.

5.2 aerprema gradiento: (poa falo de la premo je 100 km de horizontala distanco). "poa" ne estas difinita en PIV. Pli facile komprenebla

ŝajnas al mi: "falo de aer-premo en 100-kilometra distanco". Tiel estas evitebla la konstante misuzata prepozicio "po".

6. Ne sufiĉe precizaj difinoj:

6.1 Globoskopo ne povas liveri radiadon, ĝi mem ne radias! Ĝi nur mezuras la kvanton de radiado, kiu atingas ĝin en certa punkto. Tial la difino devus esti anstataŭ "ĝi liveras la enradiadon" "ĝi mezuras la radiad-intenson". En miaj multaj fakvortaroj mi vane serĉis la terminon "globoskopo". Kio estas ĝiaj etnolingvaj terminoj? Ĉu ĝi eble estas eksmoda termino por "lummezurilo" EB111/38 aŭ pli ĝenerale por "radiad-mezurilo"?

7. Sensensaĵo: (→ engreftiĝi): "se vi (??) eltranciĝis el sovaĝa olivarbo k engreftiĝis en bonan olivarbon..."

8. Tro da ekzemploj: Laŭ mia opinio estas bona, ke en PIV oni per multaj ekzemploj montras la aplikon de vortoj. Tamen ofte ekzemploj estis montritaj, kiuj komunikas nenion novan kaj tial estas balasto, kiu instigas superfluan legadon. Ne estas la celo de PIV servi kiel konkordanco de niaj unuaj aŭtoroj...

Tiom da kritikindaĵoj mi rimarkis dum mi kontrolis nur 13 paĝojn. Simila estis la rezulto je mia kontrolado de la J- kaj R1-paĝoj. Sendube aliaj kontrolintoj trovas aliajn detalojn, kiuj estas korektindaj laŭ iliaj opinioj. ... Laŭ mia opinio ricevis la PIV-redakcio kritikojn ĝis nun nur pri izolitaj detaloj, kiujn recenzintoj kaj

uzantoj pli-malpli hazarde rimarkis. Neniam la tuta verko estis ekzamenita de A ĝis Z, kiel nun okazas per kontrolado de la el la presitaj paĝoj ricevitaj skanaĵoj...«

Tiom pri la spertoj de sinjoro Eichholz. Eĉ se ni ne konsentas pri ĉiuj punktoj (laŭ ni ekz. la paro *ŝmir-graso/ŝmiraĵo* estas same „bona“ kiel *pirujo/pir-arbo*) ili certe valoras pripensi ilin.

Plibonigaĵojn de PIV el „orienta vidpunkto“ proponas s-ro **Ma Young-tae**, Direktoro de Korea Esperanto-Asocio, Seoŭlo, en »La Espero el Koreio«, nov-dec 1995 p.12-14. Ankaŭ tio precipe por „okcidentanoj“ legindaj argumentoj.

Viajn kontribuojn sendu al nia adreso, trovebla sur paĝo 63.

Multlingva Elektronika Vortaro (MEVo)

En la supra kontribuo pri la reviziado de PIV jam menciigis la projekto **MEVo**. Jen pliaj informoj pri ĝi, kiujn ni ĉerpis el cirkulero EP 95/1 (stato: 1995-05-16) de la iniciinto, sinjoro Eichholz (ei), kiujn ni tamen pro spacomanko forte mallongigis.

A. Ĝeneralajoj pri MEVo:

La multlingva elektronika vortaro MEVo aperos nur en elektronika formo sur kompakta disko, do ne kiel libro („elektronika“). Ĝi enhavos nur Esperantajn difinojn kaj Esperantajn kaj alilingvajn terminojn en laŭeble multaj lingvoj („multlingva“). Ĝi servu

al Esperantistoj (ankaŭ komencantoj) kaj ne-Esperantistoj. La nocio-kompleksoj estos sisteme ordigitaj, do ne en alfabeto ordo. Nocio-komplekso estas vortara artikolo, en kiu troviĝas la difino de la nocio kune kun vortoj aŭ terminoj en multaj lingvoj ekvivalentaj por la koncerna nocio, kiel vi konas tion de Pekoteko. Esperantaj aŭ etnolingvaj indeksoj helpas trovi la serĉatan noción.

B. Kiel okazos la ellaboro de MEVo?

La bazo de MEVo estas Plena Ilustrita Vortaro (PIV) de SAT. La bazaj MEVo-dosieroj dum la kompilado de la vortaro sekvas la alfabetan aranĝon de PIV. Estos intermetitaj ĝustaloke terminoj el la Suplemento al Plena Ilustrita Vortaro (PIVS) kaj el aliaj vortaroj, ekzemple el la Esperanta Bildvortaro, Pekoteko, la kolekto de la „lingvo-observantoj“ k.a. La intenco estas, kiel eble plej fidele sekvi la en PIV registritajn terminojn kaj difinojn, por tiel gardi la unuecon de nia lingvo. Tamen, se kompilintoj opinias, ke difinoj povus esti pli trafe, bele aŭ mallonge vortigitaj, tiam ili rajtas devii de la PIV-a difino. Ili rajtas ankaŭ proponi tute novajn terminojn kaj difinojn. Pri la selekto decidus komence R. Eichholz (ei). MEVo estos konstante prilaborita por plibonigi kaj aktualigi ĝin.

En la MEVo-kadro same kiel en la Pekoteko-kadro la tuta laboro okazas publike. Precizaj reguloj estas ellaboritaj, por en efika maniero diskuti pri la tuta vort-provizo de nia lingvo por veni al utilaj konkludoj.

C. Kiel konfliktoj estas solvotaj?

Pere de Pekoteko ĉiu rajtas publike fari proponojn kaj prezenti argumentojn kaj kontraŭargumentojn. Gravus, ke neniu provas trudi siajn preferojn. Tiel multaj konfliktoj estos solveblaj. En elektronika vortaro, eĉ se maltaŭgaj decidoj iam estis faritaj, estas ĉiam facile nuligi iam ajn decidojn. ej rekomendis ekz-e la novan laŭsone derivitan radikon "sken/" en Slipara Vortaro kaj poste en la Esperanta Bildvortaro. Pli malfrue li konstatis, ke la plimulto de la lingvo-praktikantoj preferis la grafike derivitan radikon "skan/", kiun li taksis same bona. Tial li decidis poste rekomendi nur la radikon "skan". Per elektronika globala serĉo de la liter-sinsekvo "sken" en la nun jam pli ol 10 megabajtojn ampleksanta Pekoteko, kaj per anstataŭigo de tiuj literoj per "skan" tiu tasko estis rapide plenumbla. Tamen en Pekoteko troviĝos por ĉiame la neologismo "sken***", post kiu nun estas indikita, ke la aŭtoro mem markis tiun terminon kiel EVIT, kaj ke tiun terminon anstataŭu la radiko "skan***". Tiel harmonia evoluo kaj unuecigo de nia lingvo estas ebligata.

Ĉar en MEVo ĉiu kunlaboranto estas ankaŭ kompostisto de la publikigota teksto, necesas doni precizajn instrukciojn, kiel ni registru MEVo-dosierojn, por ke la kompostaĵo aspektu unueca, kaj por ke ĝi fariĝu agrable legebla. Specimenaj dosieroj kun konkretaj ekzemploj estas haveblaj de ej aŭ de la Terminoteko-redaktanto. Neniam antaŭe tiom vastskala internacia projekto, kiu povas ampleksi ĉiujn fakojn kaj lingvojn, estis ellaborita kaj proponita.

Ĉiu kunlaboranto ricevos rekompencon pro la liveritaj registraĵoj kopiojn de aliaj registraĵoj libere selekteblaj, kaj se iam aperos la antaŭvidita kompakta disko, li rajtos aĉeti ĝin je pli favora prezo.

Nun ni rigardu, kiel MEVo-dosieroj aspektas. La ekzemploj redonitaj en tiu ĉi cirkulero estas nur malgranda parto de la kompletaj dosieroj, liveblaj sur disketoj en diversaj formatoj (*WordPerfect 4.2, 6.0, Word for Windows* k.m.a.). Ĝis nun estas haveblaj la MEVo-dosieroj pri literoj J, E2, G2, kaj R1. Kunlaborantoj povas kune kun fontindikoj registri jam ĝusta-loke aldonojn de terminoj, kiujn ili trovis en aliaj verkoj. Bonvenaj ankaŭ estas komentoj pri jam registritaj tekstoj kaj tute novaj terminoj kaj difinoj.

Certe daŭros kelkajn jarojn ĝis la tuta PIV estos registrita en elektronika formo kune kun aldonajoj el Esperanta Bildvortaro, Pekoteko kaj multaj aliaj vortaroj. Nur post kiam tiu laboro estos farita, havas sencon ordigi hierarkie (t.e. laŭfako) la tutan lingvan trezoron de nia lingvo helpe de Universala Decimala Klasifiko (UDoKo). Individuaj nombroj estos aldonitaj kaj lingvo-indeksoj simile kiel en Pekoteko aŭtomate kreitaj. Fine codoromo estos produktita.

Jen specimenaj enskriboj de la labor-versio de MEVo:

MEV# 801.27

~PIV:

{eo1} ja &&

Adv. uzata por akcenti, emfazi la realecon de ideo entenata en frazo aŭ en vorto: tio ne estas ja peko, ne povas esti

pekoli; nu, vi ja estas virinoj!; sed ni ja scias, ke da lingvoj ekzistas tre multe; sed tie la vivo estos ja tute alia; sed mi ja mem venis al tiuj ideoj; de la tago restas ja ankoraŭ multe; mi kaj Marta ni konas ja nin de la infaneco; se vi ne havos per kio pagi, oni ja prenos vian litaĵon de sub vi.

RIM. Nur por aparta forta efekto Z. metis ja en la komencon [ei(94-11): "n"] aldonita de frazo: ja se vi agos bone, vi estos forta!; ja la ĉielo ne povas vin ampleksi!

⇒ sendube, efektive; jes ~PIV'

~ei(94-11): nepre <BU> ~ei'.

~ei(94-11):

{de1} ja <BT>

{de2} ja doch <BT>

{de3} bekanntlich <BT>

{de4} wie man sehen kann <BT>

{de5} wie man weiß <BT>

{de6} ohne Zweifel && <BT> ~ei'.

~ei(94-11):

{en1} assuredly <BU>

{en2} indeed <BU>

{en3} in fact <BU>

{en4} really and truly <BU>

{en5} to be sure && <BU> ~ei'.

~ei(94-11):

{fr1} certes <GD>

{fr2} bien <GD>

{fr3} surtout <GD>

{fr4} voire même <GD>

{fr5} sans doute <GD>

{fr6} il est vrai && <GD> ~ei'.

Klarigoj:

La UDoKo-numero 801.27 indikas adverbojn (⇒ PP85-90,p1251). Poste sekvas ĉerpaĵo el PIV. La komencon de tiu ĉerpaĵo indikas ~PIV: La finon indikas: ~PIV'. En la laboraj MEVo-dosieroj la PIV-difinoj estos citataj precize tiel kaj en la samaj sinsekvoj, kiel ili aperis en PIV. Ĉiuj devioj de PIV estu indikataj per enkadraj komentoj.

En ĉi tiu unua artikolo estis laŭ opinio de ei aldonenda la akuzativa "n" al la vorto "komenco", ĉar oni demandas: kien Z. metis la vorton "ja"?

La komentoj helpas al la redaktoro de la nova PIV elimini erarojn. Sed ili servas ankaŭ al la kompilintoj de MEVo por konstati, kiuj eraroj aŭ plibonigindaĵoj estis rimarkitaj, kaj kiuj tekstoj estis ŝanĝitaj. Se iu ne konsentas kun la faritaj ŝanĝoj, tiu aldonu siajn proprajn komentojn en la sama kadro. Tiel publika diskuto pri la enhavo de la tuta nuna PIV kaj ankaŭ pri la estonta PIV estas ebligata.

Post la artikolo "ja" estis en la Eo-En-vortaro de Butler aldonita, ke oni komparu kun "ja" ankaŭ la vorton "nepre". Laŭ ei estas utila referenco kiu mankas en PIV. Tial ei aldonis post la PIV-citaĵo la linion: ~ei(94-11): nepre <BU> ~ei'. Post tio sekvas Germanaj, Anglaj kaj Francaj tradukoj por la vorto "ja". Ĉiam la fontoj estas indikitaj, en kiuj troviĝis la koncernaj tradukoj. La mallongigoj estas la samaj kiel en Pekoteko. Tiuj multaj font-indikoj ĝenas la legadon, sed ili montras klare, kiu kion kontribuis, kaj el kiu fonto tiu kontribuo estis ĉerpita. Tio en labor-dokumento estas grava. En dosiero-tipo de pli alta ŝtupo ili estos aŭtomate forigitaj.

MEV# 801.313 : 22

~ei(94-11):

{eo1} **Jabin**/o** && <EV>

Reĝo de la Kanaanidoj. <ei laŭ EV> ~ei'.

~ei(94-11):

{de1} Jabin (Kanaaniterkōnig) && <EV>

~ei'.

La propra nomo "Jabino" troviĝis en la Enciklopedia Vortaro de Wüster kaj ne en PIV. Do temas pri nova nocio-komplekso, al kiu estis aldoninda mallonga difino, verkita laŭ la Germana klarigo de Wüster. La unua parto de la MEVo-numero indikas, ke temas pri person-nomo (801.313) kun rilato al la Biblio (: 22).]

[Sekvas pliaj nocio-kompleksoj, kiujn ni forstrekis tie ĉi pro spaco-manko.]

MEV# 637.1

~PIV:

{eo1} **jogurt/o** <PIV>

{eo2} **jahurt/o** <PIV> &&

KUI Lakto acidigita per speciala fermento, kutima trinkaĵo en la Bulgaraj montoj, disvastigita en Eŭropo pro siaj sanigaj efikoj. > kefiro. ~PIV'

~ei(94-11):

{de1} Joghurt *m* && <BT> ~ei'.

~ei(94-11):

{en1} yogurt <MuSa>

{en2} yoghourt <MuSa> && ~ei'.

~ei(94-11):

{fr1} yaourt *m* <GD, PetLar91>

{fr2} yogourt *m* <PetLar91>

{fr3} yoghourt *m* && <PetLar91> ~ei'.

Por tiu ĉi nocio ekzistas du diversaj terminoj en Esperanto. "jahurto" estas la en PIV preferata termino, ĉar ĝi estas listigita tie kun difino. En MEVo ei preferis la terminon "jogurto", ĉar ĝi ŝajnas esti pli internacia. Tial ĝi estas metita unualoken.

MEV# 687.11

~PIV:

{eo1} **jako** &&

Ekstera vira vesto, ... marista jako; jako de pijamo; lanaj noktaj jakoj; jako

kun baskoj. * livreo, bluzo, kitelo, kamizolo, ĵaketo, frako.

EB#34/5,13; EB3#33=2

Aldone indikitaj estas ilustraĵoj el la unuaj eldonoj de la Esperanta Bildvortaro (EB) kaj el la tria eldono (EB3), kiu ankoraŭ ne estas havebla, sed kies etnolingvaj versioj jam ekzistas. ... Multaj ilustraĵoj en la Esperanta Bildvortaro difinas nocion pli bone ol multaj vortoj povus fari tion. En tiuj okazoj pervorta difino mankas (ekz. je la termino "junto-tranĉilego" EB#197/17).

Jen por montri kiel detala MEVo estos, ni listigas enskribo-titolojn de la nocio-kompleksoj kun »jak/o«, kiuj en la originalo ĉiuj estas difinitaj kaj tradukitaj kiel la supraj specimenoj.

{eo1} jak/et/o (1) &&

{eo1} beb/a jak/et/o &&

{eo1} lit-jak/et/o &&

{eo1} jak/et/o (2) &&

{eo1} frenez-jak/o <PIV>

{eo2} per'fort/a jak/o && <BU, EV>

{eo1} pelt-jak/o <PIV>

{eo2} pelt/a jak/o && <EB>

{eo1} Alp/a jak/o &&

{eo1} anorak-jak/o ∞ knab/in/a &&

{eo1} dejor-jak/o &&

{eo1} du-buton-vic/a jak/o ∞ komplet/o kun &&

{eo1} en'hejm/a jak/o

{eo2} hejm/a jak/o

{en3} negliĝ/a jak/o &&

{eo1} galon/it/a jak/o &&

{eo1} golf-jak/o &&

{eo1} grimp-jak/o &&

{eo1} Kanad/a jak/o &&

{eo1} knab/in/a sport-jak/o &&

{eo1} led/a jak/o &&

{eo1} ole/o-tol/a jak/o &&

{eo1} pijam/a jak/o &&

{eo1} plaĝ/o-jak/o &&

{eo1} rajd-jak/o &&
 {eo1} sav-jak/o &&
 {eo1} skerm/o-jak/o &&
 {eo1} smoking/a vest/o &&
 {eo1} sport-jak/o &&
 {eo1} tajlor-kostum/a jak/o &&
 {eo1} trejn-jak/o &&
 {eo1} unu-buton-vic/a jak/o μ komplet/o kun &&
 {eo1} vent/o-jak/o &&
 {eo1} vent/o-jak/o knab/a &&

Jen ekzemplo de nocio-komplekso, kiu ne jam troviĝas en PIV kaj estas aldonita el Bildvortaro al MEVo.

MEV# 677.057.27

~ei(95-01):

{eo1} **J-dukt/o** &&

En instalaĵo por kontinua blankigado: Vaporhejtita kaj izolita dukto en formo de J. EB#161/33.

{de1} J-Box *f*

{de2} Warena Speicher (dampfbeheizt und wärmeisoliert) *m* && <DB-de>

{en1} J-Box

{en2} steam-heated and heat-insulated J-Box && <DB-en>

{fr1} J-Box

{fr2} canal *m* de décharge du tissue chauffé à la vapeur && <DB-fr>~ei.

Per multaj pliaj ekzemploj sinjoro Eichholz en sia cirkulero montras, kiel ĉiu povus kunlabori je la MEVo-projekto kaj samtempe helpi al SAT plibonigi la venontan PIV-eldonon. Se multaj Esperantistoj kunlaboradas je la reviziado de la verko, ni per komuna laboro kapablos plibonigi kaj aktualigi nian PIVon.

La tuta ĝisnuna fina MEV-dosiero troviĝas sur 3,5 cola disko kun aliaj interesaj dosieroj kaj estas havebla aerpoŝte de R. Eichholz por US\$ 3,-

aŭ DM 4,- aŭ 5 internaciaj respondokuponoj.

La originalaj dosieroj estas en la formato de *WordPerfect* 4.2. Ekzistas eksport-eblecoj por 30 (!) aliaj program-versioj, tiel ke probable ĉiu povas kunlabori. Bv. precize indiki al kiu programo la dosieroj estu eksportitaj.

Espereble tiu ĉi priskribo montris, kiel efika kunlaborado estas realigebla, por en mallonga tempo krei unu solan elektronikan vortaregon, en kiu ĉiuj ĝisnunaj vortaroj povos kunfandiĝi, kaj al kiu novaj terminoj estos konstante aldoneblaj. Interesatoj skribu al la redaktanto aŭ rekte al R. Eichholz, Bailieboro, Ontario, Kanado, K0L 1B0

PIV2 kaj MEVo superrigarde:

PIV2	MEVo
formo:	
* libro	codoromo
* nur-Esperanta	multlingva
* alfabeto ordo	sistema ordo
cel-grupo:	
* nur Esperantistoj	ĉiuj
* progresintoj	komencantoj
agado:	
* precipe korektoj	aldono de pliaj verkoj
organizas kaj ellaboras:	
* SAT	Eichholz
* laborgrupo	ĉiuj interesitoj
metodo:	
* interna regularo	publika diskuto

Enciklopedia ...

Wüster, Eugen. Enciklopedia Vortaro Esperanto-Germana. II-a parto ko-z sur mikrofiĉoj. Wien: Internationales Esperanto-Museum.

Vere sensacia estas la apero de la dua parto de la eble plej fama Esperanto-etnolingva vortaro iam ajn eldonita: La „Enciklopedia“ (EV) de **Wüster**. Post pli ol duona jarcento ĝi finfine estas komplete alirebla kaj aĉetabla. La EV, verkita inter 1918 kaj 1920, kies unuaj kvar liveraĵoj (literoj A-KOR) aperis ĉe la eldonejo Hirt en Leipzig ek de 1923 estas en multaj rilatoj ankoraŭ hodiaŭ la plej perfekta enciklopedia vortaro Esperanta-nacilingva. Wüster pere de kunlaboranta stabo trakribis la tutan Esperanto-literaturon, surslipigis la utiligotajn partojn, kiuj poste estis la bazo por lia vortarista laboro. La parto [KOR-Z] restis en manuskripta formo. Posedanto de tiu manuskripto estas la Internacia Esperanto-Muzeo de la Aŭstria Nacia Biblioteko, kiu nun eldonis tiun ankoraŭ ne publikigitan parton de la manuskripto (pli ol 2000 paĝoj) sur mikrofiĉoj. Sur la fiĉoj aperos aldone ankaŭ la de Hans Joachim **Plehn** prilaborita parto de la vortaro (ko-l). La vortaron kaj la vortistan laboron de ĝia aŭtoro prezentas enkonduke 75-paĝa studo de la Wüster-specialisto Detlev **Blanke**.

La gravecon de la EV oni apenaŭ povas supertaksi. Legantoj, kiuj

interesiĝas pli pri la preskaŭ "krimromana" tragedio de la vortaro relegu Hans Joachim Plehn, *Biografio de duona vortaro aŭ Kial Esperantujo perdis sian gvidantan Esperantologon*, Saarbrücken: Artur E. Ittis 1985. Bonan aliron al Wüster peras la kolekto Eugen Wüster, Esperantologiaj Studoj, Memor-Kolekto Editorita de Reinhard Haupenthal, Antverpeno, La Laguna: tk-Stafeto, 1978, enhavanta ankaŭ bibliografion de la verkaro de tiu fascina homo.

Sed ni revenu al la "Enciklopedia". Kiom da vortaj trezoroj ankoraŭ kaŝiĝas jam nur en ĝia publikigita parto montris André **Cherpillod** per sia verko «Ne-PIV-aj Vortoj», listiganta multajn vortojn troveblajn en EV sed ne en PIV. Granda parto de la Ne-PIV-aj Vortoj ekzistas nun en komputora formo en Pekoteko, tiel ke facila serĉado je la Wüster-aj vortoj aŭtomate eblas. Eĉ se la eldono per mikrofiĉoj estas ne tiel facile uzebla kiel libro, ĉar speciala leg-aparato necesas, tamen la eldonado estas tre bonvena. Ja ekzistas tiuj aparatoj en multaj publikaj bibliotekoj, ekz. universitataj.

La mikrofiĉoj estas havebla de IEMW por ĉ. 100,- DM. Interesatoj skribu al IEMW der Österreichischen Nationalbibliothek, Hofburg, Michaelerkuppel, A-1010 Wien, Aŭstrujo.

Etimologia ...

Vilborg, Ebbe. Etimologia Vortaro de Esperanto. Volumo 4: N-R. Malmö [S]: Eldona Societo Esperanto 1995, 124 p. ISBN 91-85288-22-5.

En Terminoteko 10, p.11 ni recenzetis la trian volumon (literoj K-M) de tiu unika vortaro, kiu - malkaŝe dirite - apartenas al la de ni plej ŝatataj libroj sur la bretaro. Laŭ sama reguleco de dujara eldon-ritmo, „konstante frapante“ aperis samstile kaj -forme la kvara volumo en 1995. En ekl. 10 ni skribis, ke „EVE“ estas nemalhavebla por vortaristoj, ĉar ĝi instruas nin, kiel Zamenhof »modele trovis harmonian ekvilibron inter kontraŭaj vortaraj principoj«. Tiu konstato ankaŭ ĝustas pri la volumo N-R. Jen ekzemplo (la multajn mallongigojn de la originalo ni tie ĉi malŝosas):

PIPR/O (Fundamenta radiko, Plena vortaro Rusa-Internacia 1889): Latina *pip/er -eris*; Angla *pepper*, Franca *poivre*, Germana *Pfeffer*, Itala *pepe*, Pola *pieprz*, Rusa *perec*. La fontlingvoj forte diverĝas; Zamenhof alprenis la Latinan formon (eble pro ĝia internacia botanika uzo: *Piper* „-arbedo“), tamen kun ellaso de -e- (eble laŭ modelo de samtipaj Latindevenaj vortoj, precipe *kadavr/o* el Latina *cadaver*, aŭ inspire de Pola: laŭ Gregor, La fontoj de Esperanto, 2a eld. Glasgow 1982, p.28, la radiko baziĝas sur Angla kaj Pola). La ellaso donas plurajn avantaĝojn: mallonga radiko, nenia risko por kunfuzo kun *pip/er/o*, akcento analoga al tiu de la fontlingvoj. Kp. speciale la plurilate analogan spicnomon *zingibr/o*. **f** ldo same, Interlingue *pipre*, Interlingua *pipere*.

El Greka *péperi* sama senco, el Sanskrita *pippalī* sama senco (de necerta origino). - Cherpillod, Mil Ekzotaj Vortoj, Courgenard: La aŭtoro 1992, p.87.

Ĝuu agrablajn promenojn tra la originoj de nia lingvo!

Frazeologia I...

Esperantan frazeologion science esploras doktorino Sabine **Fiedler**, Riesaer Str. 5, D-04328 Leipzig, Germanujo. En »Esperanto« de UEA, apr. 1995 ŝi petis helpon per respondo de demandaro. En Esperanto Aktuell (Germanujo) ŝi prezentis kelkajn aspektojn kaj rezultojn de sia laboro. Je diversaj okazoj doktorino Fiedler jam prelegis pri tiu temo. Ŝia laboro ŝajnas al ni gravega por aŭtoroj precipe de ĝeneralaj vortaroj, ĉar ĵus la kampo de proverboj, parolturnoj kaj aliaj frazeologiaĵoj ankoraŭ estas bedaŭrinde ofte neglektata. Feliĉe ni nun disponas pri la spertoj de lingvista fakulino.

Frazeologia II ...

Wiersch, Hans kaj Kerstin. Parolturnaro germana-Esperanto. Frazoj, frazeroj, sintagmoj, dirmanieroj, idiotismoj, proverboj. 20 000 elementoj. Leuven [B]: Esperanto 2000. 1995, 414 p. ISBN 90-71205-59-2.

Temas pri bele kaj profesie farita eldono de la verko, kies provizoran kopiitan version aŭtoran de 1993 ni jam anoncis en Terminoteko 10, p. 16-17. Feliĉe oni tiom rapide trovis la Belgan „Esperanto 2000“ kiel eldoniston.

Tipaj enskriboj estas:

affenartig mit einer ~ *Geschwindigkeit*; mit einem *Affentempo/Affenzahn*;

kun rapideco de sago; kun ventega rapideco (Z).

begraben ... *da liegt der Hund ~*; jen estas la malfacila/ĝena punkto; jen estas la barilo (SP)

Germanan idiotismon sekvas Esperanta „traduko“, en la plej multaj kazoj ĉerpita el PIV, PIVS, la verkaro de Zamenhof kaj de aliaj gvidaj Esperantistoj, en kelkaj kazoj „tradukitaj“ de la aŭtoroj mem. La fontoj estas indikitaj per »(Z)«, »(SP)«, ktp.

La verko celas precipe esti helpilo por German-lingvanoj, kiuj frontas ne rekte tradukeblan esprimon.

ne-PIV-a ...

La dua eldono de la „Ne-PIV-aj Vortoj“ de nia leganto, sinjoro André **Cherpillod**, aperis jam en 1991. Krom korektoj de kelkaj klav-eraroj kaj plilongigo de la anekso kun korekto-proponoj por la revizio de PIV la dua eldono enhavas apartan enkondukon, per kiu la aŭtoro sprite-akre reagis al la kritikoj de kelkaj „fridpisuloj“ (jen lia vorto) pri la unua eldono. Kiu ne jam posedas la verkon, nepre ankoraŭ havigu ĝin al si.

Pola ...

Jam en 1990 aperis interesa represo de la Granda Vortaro Pola-Esperanto de Antoni **Grabowski**, Varsovio 1910 (represo Varsovio: Nova Pola Libro-eldonejo 1990, ISBN 83-85135-04-9) kun (bedaŭrinde nur Pol-lingva) enkonduko de Andrzej Pettyn. La nova eldono permesas

fascinan rigardon al la frua lingvo-uzo de Esperanto. Jam sur la unua paĝo eblas trovi malnovan ne-PIV-an vorton kiel *abajuro* (lampo-ŝirmilo, lum-ŝirmilo).

Zoologia ...

Laŭ la revuo „Esperanto“ de UEA (1992, p. 117) aperis nova libro de sinjoro Wouter F. **Pilger**: Provizora listo de nomoj de bestoj. Mamuloj. Lelystad: La aŭtoro Vulpo-Libro 1992, 72 p. ISBN 90-70074-35-4. Ĝi enhavas ĉ. 1700 sciencajn kaj ĉiutagajn nomojn de mamuloj, en prezento laŭ klasifika divido kaj en alfabeto ordo. La libro kostas ĉe UEA 18,30 nlg.

terminaraj projektoj

ekologia...

»Multlingva Difina Ekologia Terminaro« nomiĝas sliparo de doktoroj Lev **Medvedev** kaj Nikolaj **Gudskov**, kiun ni antaŭ nelonge ricevis. Temas pri laŭdire 570 slipoj kun Esperantaj terminoj kaj difinoj kaj Rusa, Angla, Germana kaj Franca tradukoj (stato sept. 1990). La teknika kvalito de la tajpitaj slipoj estas tiom malbona, ke parton oni ne povas legi, nur diveni. Mankas indeksoj de la tradukitaj lingvoj, tiel ke oni nur povas serĉi surbaze de Esperanto. Ĉar la terminaro en la nuna formo apenaŭ estas manipulebla kaj ĉar mankas

laŭfaka divido, malfacilas juĝi, ĉu la selektitaj terminoj iom regule kaj dense kovras la fakon ekologio. Multajn rilatojn ĝi certas havas al la forstista *Lexicon Silvestre* (vd. mal-supre). La sekretario de la iama TEC, sinjorino Ankica Jagnjiĉ, jam en 1990 komencis reklavi ĝin en komputoran datumbazon. Ni tamen nur posedas proversion de la elektronika dosiero kun apenaŭ dekduo da terminoj en malmulte disvastigita, aparte lernenda programo.

Jen hazarde elektitaj specimenoj (pro manko de Rusa skribo ni ellasas la Rusajn terminojn):

ARIDECO RUSA TERMINO

Malfekunda [~o ? nelegebla] pro troa sekeco. /PIV/

- a. ARIDITY
- g. ARIDITĀT(f)
- f. ARIDITE(f)

HERBEJO RUSA TERMINO

Tipo de herba mezofila vegetaĵaro kaj ilia loĝloko, kutime uzata kiel sovaĝa aŭ kulturata paŝtejo. /4g+Re2+PIV/

- a. MEADOW
- g. WIESE(f)
- f. PRAIRIE(f)

NOKTA FROSTO RUSA TERMINO

Nokta aŭ frumatena malplialtiĝo de aera temperaturo sub 0°C printempe aŭ aŭtune, kiam taga kaj meza diurna temperaturo estas jam(ankoraŭ) pli alta, ol 0°C. /4g/

- a. FROST
- g. FROST(m)
- f. PREMIERE GELEE(f)

POLDERO RUSA TERMINO

Ĉemara protektata per digoj marĉa ebena, kuŝanta malplialte ol maro. /4g/ ...

Ni jam ofte konsilis rezigni en terminaroj je la „nenatura“ skribo de la enskribo-titoloj nur per majuskloj. Tie ĉi pro tio perdiĝas i.a. la Francaj diakritaj signoj (»aridité« ktp.). En »arideco« termino (substantivo) kaj difino (por adjektivo) ne harmonias. Jen baza eraro, nepre evitenda. La referenco al PIV estas nepreciza: PIV ĝuste difinas »arida«, ne »~eco«. Por la Germana eblus aldoni la ĝeneralan, nefakan terminon »Trockenheit«. En »herbejo« „vegetaĵaro“ (3a persono singularo) kaj „ilia“ (pluralo) ne harmonias. En mia ekzemplero mankas listo de mallongigoj (4g ?, Re2 ?). Kial ne traduki la terminon »nokta frost« Germane per »Nacht-frost«?

La interpunkcio en Esperanto estas aparta problemo kun iom „molaj“ reguloj. Sed kial per komo disigi »pli alta, ol 0°C«? Aŭ ĉu nur temas pri tajp-eraro? Probable ne se oni vidas la (tute tipan) difino-stilon ĉe »poldero«. Komparu kun la PIV-a difino (la referenco cetere mankas): »Kulturebla tereno gajnita el la maro«. Kial ĝi estas tiom pli klara? Ĉar ĝi komencas per la decida vorto: »poldero« do estas tereno! Bone, kaj krome ĝi estas kulturebla kaj gajnita el la maro. Kaj malantaŭ digoj kaj ebena kaj tiel plu. Sed unue ĝi estas tereno aŭ ebenaĵo (ne »ebeno«). Do unue oni diru ĝin: »Marĉa, ĉemara ebenaĵo sub mar-nivelo, protektata per digoj«. Tamen eĉ post reordigo la difino ankoraŭ estas malbona kaj stile kaj enhave. Stile, ĉar „maro“ aperas dufoje en „ĉemara“ kaj „mar-nivelo“ krome subkomprenite trian fojon en

„digoj“. Denove komparu kun la pli konciza kaj pli eleganta PIV-a difino! Almenaŭ „ĉemara“ estas superflua kaj forstrekinda. Enhave, ĉar mankas respondo al la demando „kaj al kio ĝi utilas?“ aŭ „kaj kial ĝi estas grava?“ PIV respondas per »kulturebla«. Ekologia vortaro klarigu la ekologian gravecon de poldero: Restadejo por migrantaj birdoj, rezervejo de tiu aŭ alia specio, ktp. Kaj plie: Se la lando malantaŭ la digo nomiĝas »poldero«, kiel nomiĝas la lando inter digo kaj maro? Referenco estus dezirinda. En la Germana »poldero« estas »Polder«, »Koog« aŭ »Binnen[deich]land« (nur la unuan la vortaro de Medvedev indikas). La lando inter digo kaj maro nomiĝas »Außen[deich]land«, »Butenland« oder »Vorland«. Neniujn mi trovis en la vortaro de Krause. Estus do interesa havi termino-proponon por tiu nocio. Sed tie ĉi la ekologia vortaro silentas.

Ni rigardu lastan instruan ekzemplon, kiel oni ne difinu:

NITROGENFIKSADO RUSA

Kemia fiksigo de atmosfera nitrogeno far diversaj mikroorganismoj, interalie simbiozaj mikroorganismoj, loĝantaj sur radikoj de kelkaj plantoj.

a. NITROGEN FIXATION

g.

f. NITROGEN FIXATION

Bv. unue pripensi momenton, kial la difino estas mankhava kaj klopodi trovi pli bonan por vi mem.

Miaj rimarkoj estus: 1. »fiksi« estas transitiva, devus esti do »kemia fiks(ad)o« (harmonio inter difino kaj termino!); 2. »far« kontraŭas la Akademian decidon (»fare de«!); 3.

mallerta ripeto de »mikroorganismoj« (stilo! Eble: »fare de diversaj, i.a. simbiozaj mikroorg.«); 4. mikroorg. »loĝas« (? stilo! Eble: vivas, estas troveblaj); 5. La difino enhave estas multe tro neprezica (»diversaj mikroorg. sur kelkaj plantoj«) kaj same kiel ĉe »poldero« mankas klarigo pri la graveco de la proceso el ekologia vidpunkto. Komparu la difinon el la Usona vortaro *Webster*:

nitrogen fixation (noun) [1890-95]

1. any process of combining atmospheric nitrogen with other elements, as used in the preparation of fertilizers and industrial products.

2. this process as performed by bacteria found in the nodules of leguminous plants, thereby making nitrogenous compounds available to the host plants.

En la Angla do ekzistas du signifoj, teknika (1.) kaj biologia (2.). Klarigo estus dezirinda, ĉu en Esperanto estas same. Eble oni referencu al la teknika signifo. Anstataŭ iu nebula esprimo »kelkaj plantoj« *Webster* pli klare indikas »leguminous plants«. La »thereby«-frazoparto klarigas la gravecon.

Jen ni ankoraŭ komparu klarigon el Germana leksikono, kiu precize difinas la „diversajn“ mikroorganismojn sur „kelkaj“ plantoj:

stickstoffoxidierende Bakterien (Stickstoffbakterien), Bakterien, die Luftstickstoff zu Ammonium (NH₃) reduzieren; leben teils frei in Böden und Gewässern (z.B. Azotobacter), teils in Symbiose mit Pflanzen (Knöllchenbakterien der Hülsenfrüchtler, Strahlenpilze bei Erlen und Sanddorn).

Kompreneble dependas de la celo, amplekso kaj „profundeco“ de terminaro, kiom da detaloj oni volas aldoni al difino. Faka terminaro tamen estu pli detala ol ĝenerala vortaro kiel PIV. Minimumo do estu iu detal-riĉeco kiel ĉe *Webster*.

Pri la etnolingvaj terminoj ni trovis krome: {en} fixation of nitrogen, {de} Stickstoffbindung *f*, {fr} fixation *f* de l'azote aŭ fixation d'azote, {it} fissazione dell'azoto. Franca »nitrogen fixation« tre probable estas malĝusta. Laŭ la modelo de la Latinidaj lingvoj oni kompreneble povas formi la terminon {eo} fiksado de nitroĝeno apud »nitrogen-fiksado« (pro klareco prefere kun disigo-streko).

Resume la vortaro ŝajnas al ni nepre prilaborenda pro neglekto de eĉ bazaj reguloj de difinado, gramatiko, stilo kaj aranĝo. Ĝi nepre ekhavu pli klaran profilon de ekologia terminaro, traktante ekologiajn aspektojn en la difinoj. Ekologiistoj devus decidi, ĉu entute indas prilabori ĝin post la apero de la forstista vortaro.

forstista ...

Pri "*Lexicon silvestre*", interesega, multlingva forstista terminaro, ni jam raportis (vd. Terminoteko 10, p. 16). Okaze de la XIII-a Kongreso de Eŭropaj Forstistoj fine de majo 1995 aperis libro-formaj unulingvaj eldonoj por la Germana, Angla kaj Franca, eldonitaj en Pollando. Dume la laboroj pri „*LS*“ daŭras. La kompletan verkon oni esperas - eble en tri jaroj - libroforme publikigi post la vendo de la

unulingvaj eldonoj. Haveblaj estas ankaŭ elektronikaj eldonoj. Apud la origina *Paradox*-versio intertempe ekzistas Pekoteka labor-versio kun aldonitaj rimarkoj kaj komentoj. Multo restas farenda, subteno daŭre estas dezirata kaj bezonata. Interesatoj povas fariĝi membro en subtena asocio (»*Förderverein*«). Ĝi i.a. organizas fakajn kunsidojn, traktantajn problemojn de la (forsta) terminologio. La programo de la kunsido je 1995-10-23 en la bela arboriĉa urbo *Eberswalde* apud Berlino i.a. antaŭvidis: »La libera vort-farado en Esperanto (ĉe ellaborado de forstfakaj terminoj)«, »Propono de modelo de universala terminara datumbanko«, k.a. La temoj estas interesaj ankaŭ por neforstistoj. Kotizoj por la subtena asocio estas subtraheblaj de Germana impost-devo. *Lexicon Silvestre* mendu, aliĝilon kaj regularon petu de *Förderverein "Lexicon silvestre"* e.V., Dr. Karl-Hermann Simon, p/a Fachhochschule, Bibliothek, Schicklerstr. 3-5, D-16225 Eberswalde, tel. ..49-3334-6570, fakso ..49-3334-65464.

kristana ...

Pastoro Bernhard **Eichkorn**, Romäusring 20, D-78050 Villingen-Schwenningen, tel. 07721-22073, faks. 07721-22074 post la „iel-tiela“ kompletigo de la fama plantvortaro (Terminoteko 11 p. 20) nun reprenis la laborojn pri la jam de longe planita Kristana Vortaro. Unuajn malnetajn eltiraĵojn li prezentis dum la terminara

kurso en Niederalfingen (vd. mal-supre). Jen ekzemplo:

{eo1} **Aaron** BIBL *a
{eo2} **Aaron/o** *b
{de1} Aaron *c
{en1} Aaron *e
{fr1}
{la1}

Difino: Laŭ la pli aĝa tradicio li estis frato de Moseo <95/kv-0011> (Eli 4,14) kaj de Mirjam <95/kv-0012> (Eli 15,20). Li subtenis Moseon en la intertraktoj kun la popolo kaj kun la Faraono <90/kv-1520> kaj en la dezerto <>. Jam en Egiptujo <> li havis pastran <> rangon, kio klarigas lian rolon en la verkado kaj adorado de la Ora Bovido <95/kv-0013> (Eli 32, 1s-aj). Moseo lin pro tio severe admonis, sed samtempe porpetis por li (Rea 9,20). Laŭ la pli juna, la „sacerdota“ <> tradicio li fariĝis la unua ĉef-pastro <> de la Hebreoj (Lev 8-10) <>. *ĉ laŭ *c*d

Teksto: »Mi scias ja, ke via frato Aaron, la Levido, estas elokventa.« (Eli 4,14).

Fon: *a PIV[be]; *b BV[be]; *c LThK57[be]; *ĉ be; *d BibellLex68[be]; *e Webs;

95/kv-0010

Rim: «95-10-05»

Aranĝita baze laŭ la sistemo Peko-teko la Kristana Vortaro enhavos tre detalajn difinojn kaj abundajn citaĵojn el la Biblio en la rubriko »Teksto:«. Jen gravega projekto, ne nur por kristanoj sed por ĉiuj kulture interesitaj homoj. Subtenu ĝin per viaj kontribuoj al la aŭtoro.

konstru-teknika ...

En »La Merkato«, kvaronjara bulteno de Internacia Komerca kaj Ekonomia Fakgrupo, n-ro 46, okt.

1994, p.6 aperis noto pri planata konstruteknika terminaro, iniciita de Tutmonda Asocio de Konstruistoj Esperantistoj (TAKE). Oni intencas aldoni Esperantajn terminojn al mult-lingva terminaro de Eŭropa Unio (EU). En la vicoj de la sepkapa „Terminologia Komisiono“ de TAKE, eklaborinta en januaro 1994, troviĝas konataj nomoj kiel sinjoroj **Wiersch**, Germanujo, kaj **Werner**, Ĉeĥujo. Sinjoro **Ĉupin**, Rusujo, gvidis la kompiladon de Rusa-Esperanta-Rusa konstru-arkitektura vortaro (1990). Kun sinjoro **Drul**, Ukraino, li nun laboras super ok-lingva terminaro sur paperaj slipoj. Bedaŭrinde la plej aktivaj membroj de la komisiono ne disponas pri komputoroj, tiel ke kunlaboro estas malfaciligita. La grupo ankoraŭ orientiĝas pri solvoj. Detala »formato de dosiero de Konstruteka Terminaro« jam estas ellaborita. Kiu ŝatus subteni tiun projekton skribu al TAKE-terminaro, Fabien **van Mook**, Echternachstr. 24, NL-5224 TB 's Hertogenbosch, Nederlando. TAKE mem estas kontaktebla je Bruno **Schmitt**, RN 83, Rue du Tiefenbach, F-68920 Wintzenheim-Colmar, Alzaco, fakso +33-89-79.79.93. Ĝi eldonas revuon «La Domo - Jarcento 21», en kiu oni ankaŭ volas diskuti terminarajn problemojn. «La Merkato» estas mendebla ĉe Roland **Rotsaert**, Visspaanstr. 97, B-8000 Brugge, Flandrujo.

Interlinguistische Informationen

La lingvo-scienca »Gesellschaft für Interlinguistik« (Asocio por interlingvistiko, GIL) eldonas sub la reaktado de doktoro Detlev **Blanke** la German-lingvan, jar-kvaronan informilon »Interlinguistische Informationen« <Intl>. Forme modesta, sed enhave densa ĝi telegramstile kronologias eventojn en la ankoraŭ relative juna scienco-branĉo interlingvistiko. Multaj informoj estas interesaj ankaŭ por terminaristoj. N-ro 12 (1994/4) resumas la 14 (!) kontribuojn al la jar-kunveno de GIL en novembro 1994, pri i.a. »La biblioteka sistemo de Esperanto« (**Pachter**, Berlino), »Pri la aŭtonomio de planlingvoj, ekz. de Esperanto« (**Bormann**, Hamurgo), »Pseŭdoafiksoj en Esperanto« (**Dungert**, Magdeburgo), »Esploroj pri la frazeologio de Esperanto« (**Fiedler**, Leipzig) k.a. Kajero 13-14 (1995/1-2) raportas i.a. pri la kolokvo de la Akademio en Prago en julio 1994, la aktoj de la interlingvistika kolokvo de CDELI, *La Chaux-de-Fonds* kaj daŭrigas la aktualan interlingvistikan bibliografion.

La jarkunveno 1995 de GIL okazis denove en novembro 1995 en Berlino. Interesatoj kontaktu GIL, p/a Dr.sc. Detlev Blanke, Otto-Nagel-Str. 110, D-12683 Berlin, Germanujo, tel./faks. - 49-30-54.12.633.

Esperanto-Dokumente

Germana Esperanto-Instituto je la inicio de la nova prezidanto de Germana Esperanto-Asocio, sinjoro Frank **Stocker**, lanĉis novan profesie faritan serion „Esperanto-Dokumente“. Kajero 2 enhavas kontribuon de doktoro **Detlev Blanke** pri „Esperanto kaj lingvistiko - sciencpolitikaj aspektoj“ kaj alian de sinjorino **Wera Blanke** pri „Fakvortoj en Esperanto - kion fari, se la vortaro ne plu helpas?“ Ambaŭ estis prelege prezentita en fakkongreso en oktobro 1994 en Konstanco, Germanujo.

Doktoro Blanke i.a. priskribas la dezirindan rilaton inter la Esperantomovado kaj profesiaj lingvistikoj, inter movada praktiko kaj scienca teorio kaj prave kritikas la nunajn mankojn sur tiu tereno (ekz. neekzisto de scienca fakperiodaĵo pri Esperantologio). Li koncize atentigas pri ekzistantaj, ekstermovadaj bibliografioj (p. 13-14), precipe pri: „Modern Language Association of America: MLA. International Bibliography of Books and Articles on the Modern Languages and Literatures, New York: MLA“. De 1979 MLA sisteme registras relative detale kaj abunde la interlingvistikan/fakan literaturon tutmonde. Speciala sekcio pri „help- kaj internaciaj lingvoj“ ĉiujare entenas 300-400 bibliografiajn unuojn, kiuj estas komputore legeblaj (CD ROM) kaj konsulteblaj en multaj universitataj bibliotekoj. Jen unu el la multaj informoj, de tiu interesa kaj leginda studo.

Sinjorino Blanke samkajere donas koncizan superrigardon pri nia kerna temo „Fakvortoj en Esperanto“, per teksto kiu celas praktikulojn. Ni senrezerve rekomendas ĝin kiel bazan kaj minimuman informon por ĉiu, kiu deziras eklabori sur terminara kampo. El la enhavo:

1. La faklingva situacio ĝenerale kaj en Esperanto.
2. Iom pri vortaroj.
3. Glosaroj kaj aliaj vortlistoj.
4. Lasta rimedo: Farado de fakvortoj.
5. Por altigi la valoron de via laboro: denove glosaro.

Valora la studo laŭ ni estas ĵus pro tio, ke ĝi estas mallonga kaj tial „digestebla“ por ĉiu, precipe por komencantoj pri terminologio, tamen sistema kaj iel kompleta. Ĝi kvazaŭ povas servi kiel redakta programo de Terminoteko. Ni jam uzis ĝin kiel studmaterialon por la fakvorta kurseto en Niederaltingen (vd. apartan raporton en tiu numero).

La kajero, same kiel la tuta serio, estas havebla de Deutscher Esperanto-Bund, Immentalstr. 3, 79104 Freiburg, Germanujo, tel./faks. 07 61 - 289 299 kontraŭ DM 4,- .

universitataj studmaterialoj

Bormann, Werner. Die Hamburger Interlinguistik-Vorlesung. Kiel: Verlag Christian Darbellay 1995, 127 p. ISBN 3-924409-02-1.

Pri studmaterialoj de d-ro **Bormann**, Hamburgo, por kursoj enkadre de la Sanmarinaj Univer-

sitataj Seminarioj (AIS) ni raportis en Terminoteko 8 p. 9-12. Nun la aŭtoro publikigis lian prelegon kiel instru-komisiito de la universitato de Hamburgo pri „interlingvistiko, Esperanto“. La German-lingva broŝuro (Esperanto-traduko en preparo) estas interesa ne nur por la studentoj de la kurso. En tre facile komprenebla lingvaĵo ĝi rapide faras rondvojaĝon tra la interlingvistika kosmo: Nocio kaj tasko de »interlingvistiko«, historio de la planlingvoj, a priori-, kaj a posteriori-lingvoj, skemismo-naturalismo, Volapük, Esperanto, Ido, Occidental, Interlingua, internacia komunikado, lingvo-problemoj en UN, EU, ktp. Por spertaj Esperantistoj apenaŭ io nova, sed por 20-kaj-iom-aĝaj studentoj en la fakultato pri lingvistiko certe taŭga iniciilo al nova mondo aŭ almenaŭ ilo sentemigi ilin pri tio, ke tamen ekzistas lingvo-problemo kaj ke malgrau la Angla ne ĉio aŭtomate estas *okay*.

Terminarajn problemojn d-ro **Bormann** traktas sur p. 93-101, i.a. la faman „bujabeso“-problemon (problemo de vortara ekonomio: ĉu enkonduki por nacia aŭ regiona apartaĵo neologismon aŭ uzi pri-skriban terminon, tie ĉi ekz. „Franca fiŝ-suppo“; kp. nian recenzon de la Arizona Vortaro, Terminoteko 8, p. 6-7). Ironie (marĝene dirite) d-ro **Bormann** faris - ofte ripetinte la ekzemplon - tiun de li neŝatatan PIV-an vorton nemalhavebla por terminaristoj: Kiu ankoraŭ ŝatas paroli pri la „problemo de vortara ekonomio“, se li povas paroli pri la „bujabeso“-problemo? Do for „bujabeso“ por „Franca fiŝ-suppo“ kaj vivu „bujabeso“ kiel

terminologia fak-vorto! Sed (pli serioze) reen al la studmaterialoj: »Ĝenerala kaj larĝa diskuto pri terminoj en Esperanto okazas per Perkomputora Termino-Kolekto« (p.96). Ŝajnas esti hodiaŭ memkompreneble, ke oni devas mencii Pekotekon, se oni parolas pri Esperanta terminologi-laboro (kp. jam Blanke Terminoteko 11, p.14-15). Jen espereble instigo por vi ankoraŭ pli grandnombre kontribui al nia komuna diskuto.

Dezirinda estas pli klara enhavotabelo kaj listo, kiu kunigas la bibliografiajn indikojn en la piednotoj kaj faciligas profundigon de la birdofluge preparolitaj temoj. Resume do bonvena enkonduko, kiu certe trafas sian universitatan cel-grupon kaj kiun ekster tiu kadro ankaŭ German-lingvaj interesatoj profite legos.

Esperantologia I...

Welger, Helmut. Norma Esperantologio. Enkonduko, Ekspertizetoj, Kritikoj. Marburg/Lahn [D]: info-servo, 1993, VI + 41 p.

dito. La idoligo de la senescepteco. Kritikaj rimarkoj pri la doktrino de la "Analiza Skolo". La aŭtoro 1995.

Sinjoro **Welger**, Bismarckstr. 28, D-35037 Marburg, Germanujo, tel. (06421) 25856, estas diplomita psikologo, advokato kaj sperta Esperantisto. Li evoluis novan interpretan aliron al la bazaj tekstoj de Esperanto, precipe al la Fundamento. La bazan ideon de sia koncepto pri la Fundamento sinjoro **Welger** klarigas en akompana letero: »Gravan rolon ...

ludas la argumento, ke la Fundamento neniel estas aksiomaro, sed leĝo. ... Multaj eldiroj de Zamenhof klare atestas lian kvazaŭ-juristan pensmanieron. Ties radikoj troviĝas en la juda tradicio. La hebrea religio ja estas leĝoreligio. ... Zamenhof certe konis la talmudistajn metodojn por interpreti la Toraon. ... Spite al la iom malmoderna formo de tiuj reguloj, enhave ili grandparte konformas al la bezonoj de moderna jurista norminterpretado kaj al la hodiaŭaj interpretado-metodoj. ... La maniero, laŭ kiu Zamenhof traktis la Fundamenton, tute konformas al la talmudista tradicio.«

Surbaze de tiuj - bedaŭrinde tie ĉi nur tre mallongigitaj redonitaj - ideoj sinjoro **Welger** interpretas la Fundamenton same kiel oni interpretas juran tekston, ekz. leĝon, en siaj cititaj verkoj. Tiu interpret-maniero laŭ niaj scioj ĝis nun ne jam estas aplikata kaj io radikale nova. Ĝiaj rezultoj plejofte estas bone defendeblaj. Kialoj sufiĉaj por ĝui tiun intelektan skuiĝon de nia bildo pri la "bone konata" Fundamento. La tekstojn petu de la aŭtoro.

Esperantologia II...

Akademiano Aldo **de'Giorgi**, Via M. Anzi 19, I-22100 Como, Italujo skribis artikolon »Esperanto: facila, regula, senescepta, logika, belsona internacia lingvo, ĉu?«, traktantan i.a. jenajn temojn: 1. Ĉu Akademiano rajtas kritiki ankaŭ la "Sanktan Fundamenton"? 2. Belsoneco. 3. Pri reguleco. 4. Pri gramatika karaktero de radikoj. Sub la temo „reguleco“ li i.a. atentigas, ke *alfabeto* estas listo

de literoj kaj tial estas nelogike ke *analfabeto* estas homo, kiu ne kapablas legi iun alfabeton. Eble pli trafa estus *analfabetulo* aŭ *neleg-kapablulo* vortoj, ebligantaj pli facilan imagon, pri kio temas.

kiu estas kiu?

Sinjoro Christian **Darbellay**, Kaiserstr. 43/II, D-24143 Kiel, Germanujo, tel. +49-431-73.50.16 preparas duan eldonon de la konsultverko «Kiu estas kiu en scienco kaj tekniko». La unua eldono aperis antaŭ 13 jaroj. Por la dua la kompilanto jam kolektis pli ol 600 plenigitajn demandilojn kun indikoj pri adreso, profesia kariero, sciencaj publikigaĵoj ktp. de Esperantistaj sciencistoj. Jen grava kaj nepre subteninda verko ankaŭ por Esperantaj terminaristoj, kiu faciligos al vi trovi samfakanojn por kunlaboro pri terminaraj projektoj. Petu demandilon de sinjoro Darbellay kaj laŭeble baldaŭ resendu ĝin.

Tradukreto I.T.R.E.

Internacia Traduk-Reto pere de Esperanto (I.T.R.E.) celas oferti komercan tradukservon al ekstermovadanoj per duŝtupa tradukado tra Esperanto. En decembro 1994 aperis la unua, en julio 1995 la dua eldono de ĝia adresaro. Ĝi povas esti interesa kontaktilo por lingve interesataj Esperantistoj, ĉar la retanoj plej ofte estas spertaj Esperantistoj, kiuj dum la tradukado spertas lingvajn kaj terminarajn problemojn en la praktiko. Certe estus utile kolekti tiujn

spertojn per aktiva partopreno en Pekotekado. I.T.R.E. estas kunordigita de sinjoro Daniel **Durand**, Les Nids, F-49190 Saint Aubin de Luigne, Francujo.

Katalunlingvaj loknomoj

Alos i Font, Hektor. Proponoj por la esperantigo de katalunlingvaj loknomoj. Barcelono 1995, 33 p. A4: La aŭtoro.

La broŝuro »studas kiel asimili loknomojn el la kataluna lingvo en esperanton kaj samtempe diskuti plurajn aspektojn de la esperanta fonetiko.« La aŭtoro esperas, ke "la establiĝo de reguloj povas utili al formado de esperantigo, kiam urbo ekhavas specialan gravecon por la esperanta komunumo ..., aŭ kiam kataluna komuna vorto devas esti iel asimilita (ekz-e, en la manĝo-sfero: *paella*)".

La tre detala, bone ellaborita studo kun longa listo de referenc-verkoj kaj tabeloj de konkretaj proponoj de Esperantigo estas interesa por vortaristoj ĝenerale. Je la ekzemplo de la Kataluna ĝi traktas multajn problemojn de nomo-asimilado, kiujn ankaŭ aliaj lingvoj alfrontas. Fine sinjoro **Alos i Font** proponas anstataŭigi jenajn PIV-ajn formojn:

<u>PIV</u>	<u>Alos i Font</u>
Minorko	Menorko
Perpinjano	Perpinano
Rusiljono	Roselono

La studo estas havebla de sinjoro Hektor **Alos i Font**, Apartat 35001, E-08080 Barcelona, Katalunio/Hispanujo (prezo ne konata).

Dum Esperanto-seminario de Baden-Virtemberga Esperanto-Ligo (BAVELO) en oktobro 1995 en Niederalfingen, vilaĝo en suda Germanujo, ni gvidis dutagan kurseton pri termin-farado. Enkonduke estis prezentitaj Pekoteko kaj MEVo kaj raportita pri la revizio de PIV (vd. pri ambaŭ en tiu ĉi numero). Kelkaj partoprenintoj informis pri siaj aktualaj terminaraj laboroj kaj petis la grupon helpi pri konkretaj problemoj. Sekvis superrigardo pri terminaraj helpiloj libro-formaj kaj precipe perkomputoraj, kiuj estas rekte demonstrita je la komputora ekrano. Elekto de terminaraj problemoj estis teorie traktitaj kaj la ekscioj fine per praktika terminara laboro aplikataj. Laŭ la reagoj de la partoprenintoj ni esperas, ke la kurseto sukcese stimulis (de-) novan intereson pri terminaraj demandoj.

Pro la sukceso BAVELO invitas ripeti similan aranĝon en 1996 kadre de la venonta BAVELO-seminario. Ĝi okazos **1996-06-21/23** en Bildungsheim St. Bernhard, **Rastatt** en suda Germanujo, proksime al la Franca landlimo. Ni kore invitas ĉiujn legantojn kaj „lingvo-observantojn“ profiti de tiu ebleco renkonti aliajn terminarajn aktivulojn por sperto-interŝanĝo kaj aliĝi ĉe sinjoro **Alois Eder**, Grabenstr. 63 A, D-71116 Gärtringen, Germanujo, tel. 07034-22899.

TrueType-skriboj Esperanto

Rainer **Will**, Softwareentwicklung, Napoleonstock 6, 35641 Schöffengrund, tel. 06445-7944, fakso 06445-7549 je 88,- DM vendas paketon kun 8 libere skaleblaj Esperanto-skriboj, laŭdire uzeblaj en preskaŭ ĉiuj Vindozon aplikantaj programoj. Akompana programo *KeyMap* ebligas adapton de la klavaro por enigi la specialajn literojn. Same haveblaj estas *TrueType*-skriboj por Slavaj, Baltaj kaj multaj aliaj alfabetoj. Kiu havas spertojn pri tiu oferto?

Link & Link Software GmbH, Kaiserstr. 21-23, D-44135 Dortmund, Germanujo, tel. 0231-52.77.95, fakso -94, ofertas *Kirillica für Windows*. Esperanto-literoj ne enestas en la baza paketo, sed speciala versio estas havebla por 150,- DM.

Softline GmbH, Pf. 14 54, D-77698 Oberkirch, Germanujo, tel. 07802-924-0, fakso -240 ofertas *Universe for Windows*, fremdlingva tekstprogramo kun TrueType-literaroj por 32 lingvoj por 372,- DM. La Esperanto-literoj tamen troviĝas en la kompletiga paketo por aldonaj 217,- DM. Ĉu oni povas aĉeti (kaj utiligi!) nur la kompletigan sen la bazan paketon, ni ne eksciis. Spertojn ni volonte pludonos.

Dipl. Ing. Thomas **Sester**, Zusenhofer Str. 6, D-77704 Oberkirch,

Germanujo, tel. 07805-910901, fakso -902 vendas libere skaleblan skribon »Arial Esperanto« por Vindozo kontraŭ 30,- DM. La diakritaj literoj fariĝas per klavo-kombino de »^« kaj sekvanta litero »c«, »g«, ktp.

Pliajn ofertojn pri *TrueType*-literaroj de sinjoro **Diestel**, Komputila Rondo kaj la redakcio de **Eventoj** vi trovas en Terminoteko 10, p. 27-28. Se vi ankoraŭ havas problemojn pri la ĝustaj Esperanto-literoj mendu la broŝuron »Esperantaj literoj kaj komputoroj«, Kolekton 2 de interesaj artikoloj de Komputila Rondo, Hamburgo, 5a eld. 1994 ĉe Jürgen **Wulff**, Bornkamp 12, D-22043 Hamburg, Germanujo, fakso +49-40-656.06.59 (ĉ. 10,- DM).

Do vi vidas, ke tuta aro da komercaj aŭ hobiaj softvo-vendistoj liveras al vi la bezonatajn „ĉapelojn“. Teknika problemo certe ne plu ekzistas.

Biblio sur diskedo

La tekston de la Malnova Testamento ni ricevis sur 3,5-cola diskedo en la komputora formato ASCII. Tiu elektronika versio certe estas grava helpilo por terminaristoj kaj frazeologistoj, ĉar ĝi ebligas facilan serĉadon kaj kopiadon de ekzemplo-frazoj. Sendepende de ies religia kredo, la Biblio sendube estas ankaŭ lingve tre grava verko, kiu multe influis modernajn etnajn lingvojn kaj la interetnan Esperanton. Pro tio ĝi ĝuas apartan atenton en PIV, kiu citas multajn pecojn kaj signas ilin per »X«.

Mendu ĉe J. **Wulff**, Bornkamp 12, D-22043 Hamburg, Germanujo.

Budhismaj tekstoj sur diskedo

De sinjoro Ottmár **Járeb**, Blücherstr. 42, D-71116 Gärtringen, Germanujo ni i.a. ricevis diskedon kun la teksto de du broŝuroj pri budhismo, nome Hermann **Schröder**, Budho kaj la moderna homo, kaj **Njanasata**, La koro de l'Budhismo. Sinjoro Járeb skribas pri tio: "Mi planis kolekti E-tekstojn ne nur por legi kaj malmultekoste multobligi, sed por lingvistikaj laboroj." Laŭ ni tre salutinda kaj subteninda ideo. Multaj tekstoj en elektronika formo jam ekzistas, vd. nian liston en ckl. 11. Eble iu baldaŭ entreprenas oferti ilin kune sur CD-ROM?!

Plena Manlibro pri la Esperanta Gramatiko (PMGE)

Ni ricevis informon, ke sinjoro Bertilo **Wennergren**, Sannadalsvägen 4, 2 tr., S-117 65 Stockholm, Svedujo, verkis kaj ankoraŭ prilaboras PMGE. La verko de 1995-10-04 laŭdire estas konsultebla en la komputora reto „Internet“ je la elektronika adreso de la Stokholma Teknika Altlernejo: <http://www.e.kth.se/espo/pmeg1/pmeg.html>.

Ni ne jam sukcesis havigi ĝin al ni kaj estus dankaj, se uzantoj de la reto povus sendi al ni diskedon kun la elektronika registraĵo.

Traktato de la Eŭropa Unio

Sinjoroj André **Ruysschaert**, 4, rue Théodore Eberhard, L-1452 Luxembourg kaj Brian **Moon**, 2 om Klaeppchen, L-5682 Dalheim, ambaŭ Luksemburgio, tradukis la unuan parton de la traktato pri la EK (ĝis art. 102) al Esperanto. Tiu grava jura dokumento enhavas multajn terminojn interesajn pro ĉiuj Esperantistoj-juristoj kaj estas valora riĉigo de la jura terminaro de Esperanto. Petu la tekston en papera formo aŭ sur 3,5-cola komputora disketo ĉe la tradukintoj.

Elektronikaj Bibliografioj

Sinjoro Vilhelmo **Lutermano**, Fonto Gazela, Embro kaj Kastelmaŭro, F-11360 Durban'-Corbières, Francujo, tel. ..33-68.45.81.32 sendis al ni jenajn du registraĵojn en *WordPerfect Works for DOS* (WPW) kaj „eksportitajn“ al ASCII:

- Bibliografio de la Biblioteko de V. Lutermano (ĉ. 1500 libroj kaj 200 jarkolektoj de periodaĵoj)
- Bibliografio de artikoloj (ĉ. 1200 eroj)

Evidente la dua estas tre simila al nia Elektronika Bibliografio de Esperantaj Artikoloj (EBEA), kiun ni prezentis en ckl. 11. Parte ambaŭ bibliografioj enhavas la samajn erojn, ekz. ĉiujn kontribuojn aperitajn en Akademias Studoj, eldonitaj de R. Eichholz. Ni pro nekono de la klopodoj de la alia do certgrade faris saman laboron. Estonte ni nepre volas

kunordigi niajn penojn kaj serĉos vojojn unueciigi niajn datumojn.

Sinjoro Lutermano krome informas, ke li sukcesis konverti la elektronikan bibliotekon de Germana Esperanto-Instituto (vd. ckl. 11) el ASCII al la pli facile manipulebla formato de WPW. Tiu ĉi estas „tegmenta“ programaro, enhavanta diversajn subprogramojn, i.a. tekstprogramon similan al *WordPerfect 4.2* (Vopo) tamen kun limigita funkciaro, tabel-programon kaj datumbazon, k.a.. Avantaĝo estas, ke oni senprobleme povas interŝanĝi datumojn inter la diversaj subprogramoj, gardante praktike ĉiujn internaciajn signojn en la sama dosiero. Vopuzantoj uzos ĝin kvazaŭ intuicie. En Germanujo ĝi kostas iom malpli ol 100 DM.

Sinjoro Christian **Darbellay** sendis al ni datumbankon kun ĉ. 3000 Esperanto-artikoloj. Lia kolekto parte estas identa kun **EBEA** kaj kun tiu de sinjoro **Lutermano**, ekz. registras ĉiujn enskribojn el Akademias Studoj. Krome sinjoro Darbellay traserĉis ĉiujn kajerojn de Scienca Revuo kaj notis ĉiujn enskribojn. Ni konsentis kunligi niajn klopodojn kaj fari unu grandan kaj pli kompletan elektronikan bibliografion. Bedaŭrinde pro la diversaj registro-manieroj tio estas tre temporaba kaj malfacila afero. Estas bedaŭrinde, ke tri homoj eklaboris en simila direkto, parte faranta la saman laboron, ĉar ili ne sciis de la streboj de la aliaj.

5. lingvaj diskutoj

Blankaj Abioj en Nigra Arbaro

Pri la problemoj de majuskloj ĉe derivitaj adjektivoj (Germanujo-Germano-Germana aŭ Germanujo-germano-germana) ni jam raportis en

Terminoteko 7, p. 6-7 kaj 8, p. 2. *Esperanto Aktuell*, organo de Germana Esperanto-Asocio, ŝanĝis kontribuon de ni, kie ni uzis la majuskklajn formojn »Angla«, »Franca«, ktp. al la respektivaj minusklaj formoj. Pri tio ni reagis per jena letero de leganto al la redakcio: »... Tiuj arbitraj ŝanĝoj estas precipe ĉagrenaj, se ili ... kontraŭas la daŭrigo sur paĝo 62

„La listo“. Lastaj aldonoj

Jen aldonoj al nia listo de elektronike haveblaj materialoj el Terminoteko 11. Validas la samaj reguloj pri kopiado, vd. tie. Dankon al ĉiuj sendintoj.

Biblioteka Scienco/Bibliografioj

- Darbellay, Christian, Kaiserstr. 43, D-24143 Kiel, Germanujo. Bibliografio de sciencaj artikoloj en Esperanto (pli ol 3000 eroj). Enhavas i.a. kompletan bibliografion de Scienca Revuo de 1949 ĝis hodiaŭ, Akademijaj Studoj, k.m.a. dBase 3.0 kaj aliaj formatoj. Kunigita kun Vilborg/Pabst, EBEA. Stato 95-10-20.
- Flandra Esperanto-Ligo. Bibliografio de la Biblioteko de FEL (ĉ. 2100 titoloj). ASCII. Stato 1995-10. FEL, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgujo.
- Lutermano, Vilhelmo. Bibliografio de artikoloj (ĉ. 1200 eroj). Datumbaza programo *WordPerfect Works for DOS* aŭ ASCII. Stato 1995-01.
- Lutermano, Vilhelmo. Esperanto-Biblioteko de Vilhelmo Lutermano. Indikoj pri ĉ. 1500 libroj kaj 200 jarkolektoj de periodaĵoj pri Esperanto kaj interlingvistiko kun indikoj pri fako, ISBN, BIL k.a.. Datumbaza programo *WordPerfect Works for DOS*. Stato 1995-01.
- Pabst, Bernhard. Bibliografieto de Elektronike Haveblaj Esperanto-Terminaroj kaj Materialoj. La teksto el ckl.11 ĝisdatigita. Stato 95-10. Bernhard Pabst, adr. vd. supre.

Biologio

- Plant-Vortaro. Plur-lingva nomaro de sovaĝaj plantoj en Eŭropo. 8a eld. Villingen [D] 1995. Pli ol 6000 nocioj sen difinoj kun rimarkoj. eo, de, en fr, nl, sc, sv. Tre simila al Pekoteko kun kelkaj aldonaĵoj reguloj. WordPerfect 5.1. Stato 1995-10. Bernhard Eichkorn, Romäusring 20, D-78050 Villingen, Germanujo.

- Plant-Vortaro. Regularo de Rondo de Esperantistaj Flaŭristoj (REF). La „ĝenerala“, „enkonduka“ parto de la Plant-Vortaro. WordPerfect 5.1. Stato 1995-02. Adr. vd. supre.

Gazetoj

- Eventoj, n-roj 20-86. La tekstoj sen la ilustraĵoj. ASCII. 95-10-13.
- Merkato, La. Numeroj 39-50. Stato 1995-10.
- Monato. Unuopaj artikoloj, ne jam ordigitaj.

Terminologio

- Portmann, Doug. Angla-lingva artikol-serio pri la manuskripto de »Comprehensive English-Esperanto Dictionary« de Benson el »ELNA-letero«. Stato 1991-08.

Fundamenton de Esperanto, se temas do pri "miskorektoj". Laŭ la plej aktuala, deka eldono (Pizo 1991) de la baza norm-verko de nia lingvo oni uzu majusklojn en la supre menciitaj kazoj. La kialojn la prezidanto de la Akademio de Esperanto, doktoro Albault, klare priskribas en sia "antaŭvorto" (p.7).« *Esperanto Aktuell* publikigis la leteron en n-ro 1995/1, p. 15 kaj petis doktoron **Albault** pri klarigo, kiu aperis en n-ro 1995/4, p. 12 sub la titolo »Majuskloj en la Fundamento« kaj provokis kelkajn leterojn de legantoj. Leginda diskuto!

Similan rekomendon faras Rondo de Esperantistaj Flaŭristoj (REF) en sia elstara »REF-regularo por la nomoj en Plant-Vortaro« (vd. ckl. 11, p. 22): »Ni majuskligas ankaŭ la komun-lingvajn [planto-]nomojn, por ke ili estu tuj ekkoneblaj almenaŭ en la skriba formo«. Laŭ PIV oni devus skribi: »La Nigra Arbaro nomiĝas nigra pro siaj malhel-verdaj blankaj abioj« (?!). La flaŭristoj rekomendas skribi: »La Nigra Arbaro nomiĝas

nigra pro siaj malhel-verdaj Blankaj Abioj« aŭ science »... pro siaj Abiesoj Blankaj« (eldono de 95-01-01, p.33). En la eldono de 95-05-15, p. 3, estas donitaj pliaj ekzemploj: »granda Abio povas esti Abio Alba, sed Abio Granda neniam povas esti Albio Alba. Kaj malgranda Abio Granda komenc-kreskanta tute ne povas esti nomata granda Albio«. »Do la praktika vivo postulas la majuskligon kaj la nekutiman sinsekvon de ĉiuj Esperantaj.sciencaj nom-partoj«.

Rimarkinde estas, ke Esperantistoj ŝajne des pli preferas majuskligon ju pli ili pro faka laboro kaj ekkono de la praktikaj problemoj strebas al klareco. Volonte ni aŭdus vian opinion pri la temo. Pliajn argumentojn vi trovos en la cititaj numeroj 7 kaj 8 de Terminoteko.

komputoraj nocioj kaj lingva disciplino

Precipe malstabila estas la Esperanta terminaro pri la rapide evoluanta fako komputoriko. La jam

25-jara diskuto pri »komputoro«, »komputilo«, »komputero« (vd. ckl.11) estas nur unu ekzemplo. Alia estas »softvo, hardvo, frivo, ŝarvo, ludvo« ktp. aŭ la respektivaj formoj kun »varo« por la Usonaj »software, hardware, freeware, shareware, gameware« ktp. Eĉ ŝajne "klasikaj" terminoj de komputoriko, apartenantaj al la kernaj nocioj de la fako kaj interesaj ankaŭ por ĝeneralaj vortaroj, de tempo al tempo estas pridubitaj. Jen du aktualaj (mallongigitaj) ekzemploj el Pekoteko:

```
{U1} 681.327.11
{T1} KDE
{eo1} mus/o <2> *a
{eo2} maŭz**/o *d EVIT *e
{de1} Maus f*c
{en1} mouse *b
{fr1} souris f*ĉ
{nl1} muis *b*ĉ
```

Grafika enigato (85/404) en kiu troviĝas regiloj por movi la kursoron (85/435) sur komputora ekrano ... konforme al movo de la muso sur tablo-supro. ...

89 / 190

Fon: *a ei; *b ComGlo; *c CE; *ĉ esinfWoord[ei]; *d vio en LEG 94/11, p.15; *e pb;

Rim: ei (94-12-19): Mi preferas doni alian signifon al "muso" anstataŭ enkonduki la neologismon {eo2}, kiu impresis min kiel mallongigon de "maŭzoleo".

pb: Jen ekzemplo de la diskuto »senco-plilarĝigo aŭ neologismo«. Mi ne vidas argumenton, kial por tiu nocio en Eo ne sufiĉu semantika vastigo de »muso« simila al la solvo en la kvar cititaj Eŭropaj lingvoj. Ankaŭ en Eo tiu metodo estas konata, kp. PIV kapo. {eo2} ŝajnas al mi superflua kaj pro tio EVIT. «95-02-15»

Plia "klasika" diskuto estas pri la Ea termino de {de} Datei, {en} (data) file, {fr} fichier, document. Kvankam oni jam proponis aŭ en la gazetaro uzis kvar Esperantajn terminojn por tiu nocio (dosiero, rikordaro EVIT, alineo EVIT, teko) oni de kelkaj jaroj nun jen kaj jen trovas la misan, kontraŭ-PIV-an kaj superfluan Anglismon »fajlo EVIT«. Detalan diskuton tro longan por ripeti tie ĉi vi trovas en Plena Pekoteko (PP) je numero 85/434 kaj en apendico E85#067 de tiu verko.

Ĝene estas, ke aŭtoroj kaj redaktoroj jen kaj jen ripetas diskutojn jam delonge eldiskutitaj. Esperanto ne staras je nulo. Ĝi ja disponas pri aro da konsultverkoj, ekz. PIV, Bildvortaro kaj Plena Pekoteko. Do, aŭtoroj, konsultu niajn konsultverkojn!

korektoj

pro spacomanko aperos en ckl. 13!

5.3 aktuala terminaro

Sinjoro Paul **Peeraerts**, Antverpeno, demandas pri taŭga Esperantigo de jena nocio:

```
{eo1} puzl/o-bild/o *a
{eo2} memor-bild/o *a EVIT *a
{de1} Phantombild n *a
{en1} identikit picture *b
{en2} photofit picture *b
{fr1} portrait-robot m *b
{nl1} robotfoto *a
```

Serĉbildo de la polico, farita laŭ indikoj de atestantoj pri la visaĝaj ecoj de krimulo fare de grafikisto aŭ helpe de speciala komputora programo. *b

Fon: *a pp; *b pb;

95/pb-007

Rim: pp: {eo2} pro „memortabulo“ kun ja tute alia signifo de „memor-“ estas EVIT.

Kion vi proponas?

Terminoteko

Informilo pri terminara laboro en Esperanto aperas du-foje jare

Redaktas kaj respondecas:

Bernhard Pabst, Südweg 42, D-53773 Hennef, Germanujo. ☎. 49-22.42-86.65.80

Multobligas kaj dissendas:

Flandra Esperanto-Asocio (FEL), Antverpeno
Eldonkvanto: 120 ekzempleroj.

Prezo: Terminoteko estas senkosta por terminaraj aktivuloj, kiuj de tempo al tempo alsendas informojn pri siaj terminaraj aktivecoj, recenz-ekzemplerojn, diskedojn ktp. Por kompletigi la Elektronikan Bibliografion de Esperantaj Artikoloj EBEA la redaktanto daŭre serĉas malnovajn Esperanto-gazetojn. Donacojn por subteni la sendkoston oni povas ĝiri al poŝtĉek-konto n-ro 000-0266338-43 (poŝtĉekoficejo Bruselo, Belujo) de FEL favore al konto „bepa-p“ kun la mencio »por Terminoteko«. Represo kaj diskonigo de la informoj estas permesata, se la fonto „Terminoteko“ estas klare indikita.

La premio estas atribuita ĉiujare al pli ol centpaĝa nefikcia verko de vivanta aŭtoro proponita de OSIEK-ano. En 1994 ricevis ĝin sinjoro **Eichholz** pro la Bildvortaro, en 1992 d-ro **Vilborg** pro la Etimologia Vortaro. Honore al d-ro Broadribb *La Gazeto* en n-ro 60 de 1995-10-31 publikigis spritan, pensigan kaj legindan aŭtobiografieton de „izola Aŭstralia Esperantisto“, vidanta la Eŭropan movadon de ekstere. Koran gratulon al d-ro Broadribb pro tiuspeca agnosko de lia laboro. Fariĝi OSIEK-ano kaj proponi verkon por la premio en 1996 vi povas per la adreso *La Gazeto*, F-55210 Creuë, Francujo.

kurso pri termin-farado en 1996

okazos en la kadro de la 19a BAVELO-seminario 21a ĝis 23a de **junio 1996** en **Rastatt**, Germanujo, kleriga centro („Bildungsheim“) St. Bernhard. Pliajn informojn vd. en tiu ĉi numero aŭ petu de sinjoro Alois **Eder**, Grabenstr. 63 A, D-71116 Gärtringen, Germanujo, tel. 07034-22899.

6. niaj vortaristoj

Donald Broadribb

Ni ĝoje sciigas, ke nia leganto doktoro **Broadribb**, „peranto“ inter Pekoteko kaj la Makintoŝ-mondo, gajnis la OSIEK-premion 1995 por sia traduko de *La Respubliko* de Platono.

Vilma Sindona Eichholz

Je la 15a de julio 1995 mortis sinjorino Vilma Sindona Eichholz, la edzino de Rüdiger Eichholz, post jaro de kuraĝa batalo kontraŭ kancero. Estinte profesia instruistino, ŝi i.a. verkis la internacian Esperanto-kurson „En novan mondon“. Multilate ŝi fidele kaj sindone subtenis la agadon de sia edzo, nelaste per zorga kaj akurata kontrollegado de publikigaĵoj. Ni sincere kondolencas al nia amiko Rüdiger kaj la du filinoj.

la historia citaĵo

»Dum la enkonduko de novaj vortoj estas afero tute bagatela kaj ne bezonas eĉ la permeson de la Lingva Komitato, la enkonduko de tio, kion mi nomas „neologismoj“ (t.e. de novaj formoj, kiuj devos konkuradi kun formoj ekzistantaj jam en la „Fundamento“) estas paŝo tiel gravega kaj tiel skuanta, ke ni povas tion ĉi permesi al ni nur *tre malofte* (ne pli ofte ol unu fojon en 5-10 jaroj).«

Zamenhof, pvz 06-13 kaj pvz 06-115

Al ĉiuj legantoj, „lingvo-observantoj“, kaj amikoj plej afablajn salutojn okaze de Kristnasko kaj plej bonajn dezirojn por sukcesplena kaj paca jaro 1996. Amike pb

Averto okaze de la represo 2006

Enhave senŝanĝa represo de la broŝura eldono de Decembro 1995. La listo de la PIV-aj fakoj reviziindaj uzas skribon „EspeTimes“, pri kiu ni ne plu disponas, tiel ke tie ĉi aperas sensencaj simboloj. Pro la alia skribo la iama paĝo-aspekto (precize 32 paĝoj en formato A5, numeritaj de paĝo 33 ĝis 64) ŝanĝiĝis, sekve la enhavo-tabelo en tiu pdf-versio ne plu indikas la ĝustajn paĝojn.

Multaj kontakt-adresoj ne plu validas.

Kontaktu nun

**Bernhard.Pabst[ĉe]gmx.de
(anstataŭigo [ĉe] per @)**

© Bernhard Pabst, 09.2006